

**JURA
TRIBUNO
INTERNACIA**



N-ro 19

Jaro 2021 : 1

Internacia Jurista Esperanto-Asocio



Eldonita de Internacia Jurista Esperanto-Asocio
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo


Poŝta adreso: Jura Tribuno Internacia
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

Ret-adreso: jurista@esperanto.ac

Direktoro: José M. Rodríguez
Kunlaboris ĉi-numere: D-ino M^a Rafaela Urueña Álvarez (Hispanio)
Advokato Miguel Faria de Bastos (Portugaliao)
Alejandro Burgos Escalante (Hispanio)

ENHAVO

Jura revuo en epidemia tempo	3
Vivo de la Asocio	5
La Ĉarto de la Tero	12
Juraj Informoj	20
Opinio de la Internacia Kortumo	
pri la Ĉagosoj	26
Jura Vortaro: <i>Kaŭcio</i>	33
Galerio de Elstaraj Juristoj	
<i>Umberto Stoppoloni</i>	35
Kino kaj Juro “La Firmao”	36
Aliĝo al IJEA	38



Jura revuo en epidemia tempo

La kronviruso KOVIM-19 okazigis terurajn efektojn kiuj neniun lasis ne-tuŝite, kompreneble ankaŭ al la internacia lingvo. Centoj da kongresoj kaj renkontiĝoj nuliĝis de post somero 2020, inter ili du universalaj kongresoj.


Certe, okazis virtualaj kunvenoj anstataŭ tiuj renkontiĝoj, tamen interreta kontakto neniam povos superi la rektajn salutajn konversaciojn.

Sendube la nuligo de la du lastaj universalaj kongresoj, tiuj de la pasinta jaro en Montrealo kaj tiu de la jaro 2021 en Belfasto, nuligita laŭ lastminuta sciigo de la organizantoj, ankaŭ okazigis problemojn al nia jurista asocio.

Tiel, nia plej grava agado ĉiujare estis la okazigo de kunveno kadre de la UK, do, la nuligo de la plej grava renkontiĝo de la esperantistaro kaŭzis problemojn al nia asocio, inter ili, ĉefe la ne-apero de la revuo dum la pasinta jaro.

Tamen, ĉi tiu situacio ne povis daŭriĝi eĉ ne unu monato pli kaj pro tio, ni decidis eldoni denove la juran revuon en esperanto, kvankam la publikigaĵo ne povos esti prezentita kaj disdonita dum la jurista renkontiĝo.

Pro tio nia revuo ŝanĝiĝas. Ekde nun *Jura Tribuno Internacia* aperos ne unu sed du-foje en la jaro, same ni decidis publikigi



retan revuon anstataŭ paperan. Tamen, ni ne forgesas la eblon surpaperigi ĝin por tiuj kiuj deziras havi revuon enmane kaj ne legi ĝin sur-ekrane, kvankam, kompreneble, temus pri malgranda kvanto da ekzempleroj.

Ni daŭrigos la saman projekton kaj enhavon de la pasintaj numeroj. Do, ni metas je la dispono de niaj legantoj,

membroj kaj simpatiantoj de la jurista asocio, sciencan revuon, nun iomete pli alloga el la grafika vidpunkto.

Ni esperas, ke ĉi tiu ŝanĝo plaĉos al niaj legantoj. Al ili ni sciigas nian pretecon ricevi kunlaboraĵojn kaj kompreneble, kian ajn komenton, kritikon kaj konsilon, se tio helpas plibonigi la juran revuon en esperanto.

Do, bonan legadon !



Figuro de la Justico ĉe la Dublina Kastelo en Irlando



Vivo de la Asocio

Fine de la pasinta jaro, Japana Esperanto-Instituto sciigis al Universala Esperanto-Asocio pri la deziro de ekster-esperantia japana firmao eldoni revuon kun la nomo “Esperanto”. La informo havigita ankaŭ avertis pri la ebla preteco de tiu firmao malpermesi al esperantistaro libere uzi tiun nomon, kiu ja apartenas al revuo eldonita de UEA ekde la jaro 1905.

Siafoje, UEA kontaktis kun Internacia Jurista Esperanto-Asocio por peti juran opinion pri la afero, surbaze de jenaj demandoj:

- *Kion faru UEA?*
- *Kion faru la japana Landa Asocio JEI?*
- *Ĉu estas efektiva risko pri plua uzado de la marko Esperanto inter alie por nia Revuo ?*

Kvankam inter la celoj de IJEA ne troviĝas leĝe konsili, ĉefe pro la fakto ke ne ekzistas ununura jura sistemo en la mondo, nia asocio konsciis, ke ni devis respondi kiel eble plej lerte kaj rapide al la demando proponita de UEA. Post debato inter la estraranoj de nia asocio, ni oferis al UEA la respondon kiun sube ni aperigas.

Kio okazis fine? Ĉu ĉi tiu historio jam finiĝis? Nu, laŭ informoj de Japana Esperanto-Instituto, la firmao finfine rezignis pri la aperigo de samnoma revuo.

1. Pri la opinioj de Internacia Jurista Esperanto-Asocio.

Sur la statuto de Internacia Jurista Esperanto-Asocio (IJEA) oni ne mencias la eblon havigi jurajn konsilojn aŭ informojn al homoj aŭ asocioj. Tamen, pro la fakto, ke IJEA subtenas kunlaborajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj post la peto de UEA rilate la eblan publikigon de revuo “Esperanto” en Japanio, ni faros escepton kaj ni respondos al urĝa peto de UEA obteni juran konsilon pri tiu afero. Malgraŭ tio, estas necese agnoski, ke leĝoj kaj reglamentoj estas tute malsimilaj en unu aŭ en aliaj landoj, do, malfacile estas konsili el internacia vidpunkto por havigi solvon al nacia problemo.

2. Pri la valideco kaj efiko de la opinioj de Internacia Jurista Esperanto-Asocio.

Kompreneble, la opinioj de IJEA tute ne implikas juran asistadon de IJEA rilate al UEA, do, la opinioj de IJEA estas nur tio: opinioj kaj ili nur celas provizi la petanton per juraj bazaj konoj. Por plia ellaborita jura asistado, ĉefe se temas pri leĝoj aŭ reglamentoj de konkreta ŝtato, ni konsilas peti la profesion kunlaboradon de advokato en tiu ŝtato. Do, IJEA tute ne respondeciĝas pri la senerara efiko de siaj opinioj rilate konkretan ŝtaton.

3. Ĉu estas eble efektiviĝi kopirajton rilate Esperanton?

Elpensitaj lingvoj estas diskonigitaj en unu aŭ pliaj verkoj, do tiuj lingvoj apartenas al la aŭtoro de tiuj verkaĵoj. Ni vidu ekzemplon pri unu el la plej konataj nuntempaj aperoj pri ĉi tiu temo, tiuj lingvoj elpensitaj de la brita aŭtoro J.R.R. Tolkien. La administrado de tiuj lingvoj apartenas al la entrepreno “*Tolkien Estate*”, kies celo estas administri kaj trakti la havaĵon de Tolkien, inkluzive ties kopirajtoj. Ĉi tiu entrepreno sciigas jenon en sia TTT-paĝo:

“La elfaj lingvoj estas arta kaj literatura elpenaĵoj de J.R.R. Tolkien, do ĉi tiuj kreaĵoj estas protektitaj pro la kopirajta sistemo en la plejmulto (se ne en ĉiuj) jurisdikcioj je monda nivelo”.

Tio same okazas al la lingvo *Klingon*, apartenanta al la varnomo *Star Trek*, kiu sukcese disvendis pli ol 250.000 ekzemplerojn de la unua vortaro en tiu lingvo. Ĉi-kaze, kopirajtoj apartenas al la usona firmao *Paramount Pictures*, al kiu apartenas la nomoj *Star Trek* kaj *Klingon*. La aŭtoro de ĉi tiu lingvo S-ro Marc Okrand vendis siajn aŭtorajn rajtojn al la usona *Paramount Pictures*.

Ĉu tio signifas, ke neniu povus verki libron en la klingona lingvo sen la rajtigo de *Paramount Pictures*? Tute ne. La usona leĝaro pri kopirajto sciigas (17 U.S. Code § 107), ke, kvankam verkaĵo aŭ nomo estas protektitaj, tio ne signifas, ke kiu ajn povas ne rajtas eldoni verkon kun la celo kritiki, komenti, informi aŭ instrui pri la enhavo de tiu protektita verkaĵo. Tiuj agadoj ne damaĝus la aŭtorajn rajtojn.

Malsimila afero estus la deziro modifi tiun verkon aŭ varon. Ni konu la kazon pri la lingvo *Loglan*, kies unuaj parolantoj deziris partopreni en la fina ellaborado de ĉi tiu idiomo, ili eĉ eldonis libro-metodojn kun solvoj malsimilaj al tiuj proponitaj de la aŭtoro mem. Tiam, D-ro James Cook Brown, kiu inventis kaj registris la lingvon *Loglan*, procesis kontraŭ tiuj eldonantoj, kiuj finfine devis forlasi la aferon daŭrigi la laboron de D-ro Cook Brown. Ili forlasis tiun taskon kaj ili kreis novan lingvon *Lojban*.

Kaj rilate al Esperanto? Nu, ekde la unuaj jaroj de la movado, D-ro Zamenhof rezignis la administradon de la lingvo, tio okazis en la jaro 1905 kiam li, kune kun pliaj parolantoj de la internacia lingvo, subskribis la Deklaracion pri la Esenco de la Esperantismo, kies 3-a punkto proklamas jenon:

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon kaj por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas nenies propraĵo nek en rilato materiala nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri ĉi tiu lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritaĵoj de tiu lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo”.

Estas necese mencii, ke oni adoptis ĉi tiun paragrafon por eviti la tiutempan monopolon de la franca eldonejo *Hachette*, kiu post la subskribo de kontrakto kun D-ro Zamenhof mem, ŝajne montriĝis kiel monopolanto rilate la eldonadon de libroj en la lingvo Esperanto. Do, la plej grava rezulto de tiu 3-a paragrafo estas la fakto, ke la aŭtoro de Esperanto rifuzis ĉiajn rajtojn kaj la deklaro, ke Esperanto, kiel ĉiuj naturaj -t.e. ne-elpensitaj- lingvoj, estas nenies propraĵo.

Krome, estas necese diri, ke la uzo de la nomo aŭ parto de la nomo “Esperanto” por nomi aliajn lingvojn, estas afero pri kiu la Esperantomovado neniam kontraŭis. Tiel, oni akceptas, ke la internacia lingvo *Ido* estas ankaŭkonata kiel “*Esperanto reformita*” kaj dum multaj jaroj ĝi estis tiel konata “*Ido-Esperanto reformita*”, aŭ lastatempe la elpensado de lingvo, aŭ ĵargono, por funkciuloj de la Eŭropa Unio, konata kiel “Europanto”. Pri ambaŭ lingvoj (*Ido-Esperanto reformita* kaj *Europanto*) ekzistas libro-metodoj, eldonaĵoj, TTT-paĝoj, ktp. Ĉi tiuj lingvoj neniam proklamis sin kiel la veraj elpensadoj de D-ro Zamenhof kaj, inverse, nia movado neniam malpermesis al tiuj lingvoj, tio estas al ties parolantoj kaj al oficialaj organizoj, la uzon de la vorto “Esperanto”.

Do, rilate la demandon, ĉu estas eble efektiviĝi kopirajton rilate Esperanton, jen respondo: en ĉi tiu momento tute ne. Nur dum la unuaj jaroj de la lingvo, D-ro Zamenhof rajtis proklami kaj registri siajn rajtojn kiel elpensanto de la lingvo, tamen li rezignis pri tio. Do, nuntempe, tio tute ne eblas, nek favore al kelka homo aŭ al kelka asocio.

4. Ĉu estas eble efektiviĝi kopirajton de la nomo “Esperanto” rilate objekton aŭ ideon kiu ne estas lingvo?

Jen afero tute malsimila al tiu de la tria punkto. Ni imagu jenon: neniu akceptus la eblon registri la nomon “*Berlin*” por protekti ĉiujn objektojn aŭ ideojn. Se tio estus akceptata, la posedanto de tiu absoluta kopirajto de la nomo “*Berlin*” povus peti al la lokaj aŭtoritatuloj de la germana ĉefurbo ne uzi tiun nomon. Tio estas facile komprenebla.

Tamen, atentu, ĉu estus eble enregistri la nomon “*Berlin*” kiel varnomon de bier-kompanio? Kompreneble jes. Se tiel, neniu, krom la posedanto, rajtus produkti bieron kun tiu nomo. Do, ĉu ni povus enregistri la nomon “Esperanto”, kiel varnomon por bierojn, horloĝojn, aŭtomobilojn aŭ aliajn objektojn. Kompreneble jes. Estas necese agnoski, ke la Esperanto-movado eĉ fieras pri tio, memoru, ke kiam oni parolas pri nia lingvo ni orgojle mencias, ke ekzistas horloĝo kun tiu nomo, ankaŭ aŭtomobilo, ktp.

Simpla traserĉado pri internaciaj registroj montras preskaŭ 100 objektojn, programojn aŭ ideojn, kun la nomo “Esperanto”:

- En Ĉinio Li Zhongui en la jaro 2003 enregistris kun la nombro 01123005.3 komputil-programon sub la nomo “Esperanto” kiu kapablas skribi per-mane sur la ekrano.

- Por esti protektita en kelkaj landoj Michel Pierre Debien en la jaro 2000 enregistris kun la nombro PCT/ES1999/000129 bicikledan framon ankaŭ kun la nomo “Esperanto.

- En la jaro 2004 S-ro Barabash A.P. enregistris en Britio kun la nombro 2002102479/14 metodon por pritrakti ostajn frakturojn kaj tiu sama nomo.

Kaj tiel longe plu...

Do, por respondi al la demando ĉu estas eble enregistri sub la nomo “Esperanto” objektojn aŭ ideojn malsimilaj al lingvoj, oni devas aserti ke la nomo de nia lingvo povas esti uzata por enregistri kion ajn. Tiu registro povus esti plenumita de esperantisto aŭ ne-esperantisto kaj kompreneble, se iu enregistras ion sub la nomo “Esperanto” neniu alia homo, neniu alia asocio, povus produkti tiujn objektojn. Kompreneble, la celo de niaj esperantistaj asocioj ne estas ellabori bieron, fabriki horloĝojn aŭ krei informadikajn programojn, do, la registro de tiuj, kaj multaj aliaj objektoj, sub la nomo “Esperanto” tute ne kontraŭas la agadojn de niaj asocioj.

5. En kiuj ŝtatoj estas validaj tiu registro?

Kiel dirite, se oni enregistras la nomon de nova biero “*Berlin*” en germana varnom-oficejo, tio malebligos la produktadon de biero fare de alia homo aŭ kompanio nur en Germanio. La protektado de varnomo okazas en la nacio kie ĝi estis enregistrita. Estas eble plenumi diverslandan registron, tamen ĝi estas tre multekosta. Ni vidu ekzemplojn:

- Peto de nacia varnomo en internacia oficejo pri patentoj: proks. 36 €
- Enregistrigo en la internacia oficejo: inter 600 kaj 800 €.
- Efektivigo de la enregistrado: 90 € po nacio.

Do, se ni deziras ampleksigi la registron de varnomo en kvin ŝtatoj, krom la lando kie unue enregistriĝis, la kosto estus proksimume inter 1000 kaj 1200 €. Se tiu protektado estas en la tuta Eŭropo la kosto povus esti eĉ preskaŭ 2500 €. La efektivigo de tiu enregistro daŭrus 10 jarojn. Eble pro tio, tutmonda registrado nur estas plenumita de grandaj firmaoj, *Coca Cola*, *IBM*, *Microsoft*, ktp.

Tiel, se la registro estas valida nur por unu ŝtato, ni memoru la ekzemplon pri la germana biero “*Berlin*”, ĝi povus esti ellaborata en alia ŝtato kun tiu sama nomo.

6. Ĉu ankaŭ eblas registri revuon kun la nomo “Esperanto”?

Oni jam asertis, ke estas eble enregistri objektojn per varnomo “Esperanto”, do, biero, horloĝo, aŭtomobilo, informadika programo, ktp, povas esti nomitaj “Esperanto”. Ĉu ankaŭ revuo? Sendube jes. Sed atentu, kiel dirite por efektivigi tiun registron tutmonde estus necese elspezi grandan kvanton da mono, memoru la ekzemplon: nur por 5 ŝtatoj inter ili Eŭropo pli ol 2.000 € ĉiu 10 jaroj.

Do, la enregistriĝo de la revuo “Esperanto” por la tuta mondo estas preskaŭ ne-ebla pro monaj kialoj, krome la tutmonda registro ne estas ebla, pro la fakto, ke nur 80 ŝtatoj, el tiuj 200 ekzistantaj, admisias la tutmondan enregistriĝon.

7. Kio okazus se oni enregistras en Japanio revuon sub la nomo “Esperanto”?

La enregistriĝo de revuo en Japanio sub la nomo “Esperanto” tute ne malebligas la eldonadon en Nederlando de revuo kun tiu sama nomo, kompreneble se la enregistranto ne ampleksigas la validigon de la registro en

Eŭropon (memoru pli ol 2.000 €). Do, estus eble disvastigi nian revuon, ĉar nederlanda, en Japanio. Se temas pri asocioj kun nomo “Esperanto” ili povas ekzisti sen-probleme, malgraŭ tiu supozita registro. Kompreneble la ekzisto de “Esperanto-Domo” aŭ aliaj objektoj kun la nomo “Esperanto” trovas nenian problemon. Ankaŭ la ekzisto de revuoj kun nomoj similaj (sed ne egalaj) al Esperanto, tiel “La Esperantisto”, “Japana Esperantisto”, “Esperanto-movado en Japanio”, ktp.

8. Ĉu posedanto de nomo “Esperanto” por nova revuo povus klopodi ĉe juĝa instanco la nuligon de la uzado de la vorto “Esperanto” fare de la E-movado?

Kompreneble oni povas klopodi tion, tamen estas necese memori, ke Japana Esperanto-Instituto ricevis la kvalifikon de fondusa jura persono jam en la jaro 1926. Tiel, kvankam ne enregistrita kiel varnomo, oni povas atesti pri la oficiala ekzisto de asocio kun la nomo “Esperanto” de antaŭ multegaj jaroj, kaj la uzo de tiu nomo ricevis neniun plendon, do temis pri akceptita afero en la japana socio kaj tio esas facile provebla ĉe juĝa instanco.

Do, revuo kun la nomo “Esperanto”, enregistrita fine de 2020, tute ne malebligis la rajton uzi la nomon “Esperanto” al asocio kiu portas tiun nomon ekde la jaro 1926. Tiel, ni ne povus eviti la aperon de revuo “Esperanto” en Japanio, eĉ se ĝi uzas la anglan lingvon. Sed male, la eldonanto de tiu revuo ne povus malebligi la ekziston de daŭra asocio kun la nomo “Esperanto” en Japanio, ankaŭ ne la disvastigo de nederlanda revuo en Japanio, ankaŭ facile provebla ties eldono ekde la jaro 1905, eĉ se ĝi ne registris ties nomvaron.

Resume:


- Ne estas necese registri la varnomon “Esperanto” cele la protektadon de nia lingvo. Tiu, kiu povus fari tion (D-ro Zamenhof) rezignis fari ĝin. Krome la aŭtoro de la lingvo forpasis antaŭ pli ol cent jaroj, do ĉiuj eblaj rajtoj kiel fondinto jam malaperis.

- Ĉu estus konvene enregistri la nomon de la revuo “Esperanto”? Nu, tio estus konvena, nur se oni scias, ke iu deziras eldoni samnoman revuon en Nederlando. Kaj malgraŭ tio, estus facile provebla, ke nia revuo ekzistas de antaŭ pli ol 100 jaroj, do denove ni havas historiajn rajtojn rilate tiun nomon el la eldona vidpunkto.

- La nomo “Japana Esperanto-Instituto” aperas enregistrita en la japana administracio ekde la jaro 1926. Tiu registro kaj daŭra uzado dum preskaŭ 100

jaroj ricevis nenies plendon. Administraciaj registroj ne egalas al varnoma oficejo, tamen ili atestas pri la konstanta kaj senproblema uzo de nomo.

Internacia Jurista Esperanto-Asocio



Iustitia est domina et regina omnium virtutum

Mārcus Tullius Cicerō

Justeco estas la mastrino kaj reĝino de ĉiuj virtoj



La Ĉarto de la Tero

D-ino Rafaela Urueña Álvarez
Hispanio

Nun, post tiom da jaroj ne pensante pri nia klimato, kiam ni ekkonscias pri reala problemo pri la klimatsanĝiĝo, kiu minacas la postvivadon de nia terglobo, kaj sojle al la 20-a datreveno de sia oficiala lanĉo, mi opinias, ke estas taŭga momento por konsideri la gravecon de tiu flanklasita kaj malkonata dokumento, nome, la “Ĉarto de la Tero”. Ĝi estas deklaro pri bazaj etikaj principoj por tutmonda daŭripova evoluigo. Ĝi alvokas la homaron al helpo de kreado de mondskala partnereco, laŭ etika vizio pri medioprotektado, homaj rajtoj, justa socia evoluo kaj paco, kiel temoj nedisigeblaj. Unuvorte, la Ĉarto estas samtempe dokumento kaj daŭro.

I Grava dokumento

Tiu ĉi dokumento aprobata post vastskala diskutado ĉefe dum 1995, per komuna renkontiĝo kun Neregistaraj organizoj (NRO) kaj kun la komisiono por la Ĉarto de la Tero, en marto de 1997 ĉe la Rio+5 Forumo, estis publikigita la unua malneto kiel “dokumento de progreso”. La dua malneto sekvis en 1999, per partopreno de miloj da diversaj kulturaj kaj sociaj sektoroj. Fine, en marto 2000, dum renkontiĝo de la Komisiono en UNESKO, kun ĉefsidejo en Parizo, oni enmetis la lastajn aldonaĵojn kaj publikigis la definitiva versio.

La oficiala aprobo okazis la 29-an de junio 2000, dum ceremonio en la Paco-Palaco en Hago, kun partopreno de la Reĝino Beatrikso el Nederlando.

Oficiale oni strebis atingi adopton de la Ĉarto okaze de la Mondopinto-kunsido ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN) en Johanesburgo 2002, sed tiu Ĉarto estis nek aprobata nek oficiale diskutita tie, kvankam en tiu mondkonferenco ĝi ludis gravan rolon kaj estis multe menciita en diversaj dokumentoj.

Antaŭaĵoj de la Ĉarto de la Tero

- 1982: Monda Ĉarto de la Naturo. Ĝi estas eble la plej elstara ekologia deklaro ĝis 2000, kiam oni lanĉis la Ĉarton de la Tero, kaj estis avangarda sisteme, aprobita de la Ĝenerala Asembleo de UN en 1982.



Monda Ĉarto de la Naturo

**Aprobita de la Ĝenerala Asembleo
de Unuiĝintaj Nacioj la 28-an de
oktobro 1982**

- 1987: Informo *Brundtland*. La Monda Komisiono pri Medio kaj Evoluigo de UN (*Brundtland* Komisiono) per sia informo de 1987 “Nia estonteco por ĉiuj” alvokas al kreado de Ĉarto enhavonta la fundamentajn principojn por daŭripova vivo. La Raporto *Brundtland* difinis unuafoje la koncepton pri daŭripova evoluigo kiel “tiu kiu plenumas la nunajn bezonojn de la homaro, sen limigi eblojn de la estontaj generacioj plenumi la siajn”

- 1990: Unua Raporto de la Interegistara Grupo de Ekspertuloj pri Klimat evoluado (GRIEC) kiu avertis la internacian komunumon pri la riskoj de tutmonda varmigo pro koncentriĝo en la atmosfero de gasoj je forceja efiko.

- 1992: Dua Pintkunsido de la Tero pri Medio kaj Evoluigo, okazinta en Rio-de-Ĵaneiro (Brazilo) 20 jarojn post la Stokholma Pintkunsido. Ĉi tie oni popularigis la esprimon “daŭripova evoluigo” koncepto kiu komencis esti uzata en amasmedioj. Sur tiuj bazoj, la konferenco adoptis tri nedevigajn deklarojn, nome “Agendo 21” (por la 21-a jarcento), “Deklaracio anoncanta la ĝeneralajn principojn de mediokonservado, kaj “Deklaracio pri arbaroj”. Krome, tre grava estis la malfermo al subskribo de du devigaj traktatoj, tiu pri Klimatŝanĝiĝo, subskribita la 5-an de junio en Rio-de-Ĵaneiro, kaj tiu pri Biodiverseco, adoptita en Najrobio la 22-an de majo kaj poste subskribita la 5-an de junio en Rio-de-Ĵaneiro dum la Konferenco pri Medio kaj Evoluigo. En ambaŭ traktatoj la defendo de la klimato kaj de la biodiverseco estas proklamitaj kiel “Komuna intereso de la homaro”.

Dum tiu Pintkunsido superflugis ankaŭ la etika bazo, kvankam la efektiviĝo de la Ĉarto de la Tero ne eblis tiam. Tamen la Agendo 21 estis tre grava nedeviga dokumento kaj anstataŭ la Ĉarto oni decidis redakti kaj aprobi la “Deklaracion de Rio-de-Ĵaneiro pri Medio kaj Evoluo”.

Pro tio, tiuj laborkunsidoj okazintaj dum la Turmonda Forumo de NRO-j dum 1993 kaj 1994 estis ege signifaj por la estontaj jaroj.

Dum tiu tempo, la organizantoj de la Pintkunsido de Rio-de-Ĵaneiro, ĉefe Maurice Strong, Ĝenerala Sekretario de la Pintkunsido, Mihail Gorbaĉov Prezidanto de “Green Cross International” kaj aliaj gravuloj, kiel Rund Lubbers, ĉefministro de Nederlando, decidis novan strategion por prilabori la Ĉarton. Konsciaj pri la neebleco solvi per si mem la tutmondajn problemojn ĉe UN, ili fiksis novan iniciaton, kun partopreno de la civila socio kaj entreprenoj, serĉante dialogon de malsupre supren.



- 1997: Fondiĝas la Komisiono de la Ĉarto de la Tero, kun partopreno de 23 gravuloj de diversaj kontinentoj, kiuj pretigis veran tekston. La fina versio estis aprobita en Parizo, en la sidejo de UNESKO, en marto 2000 kaj, kiel dirite, oficiale oni lanĉis la tekston en la Palaco de Paco en Hago.

Principaro kaj rilato al la Celaro por Daŭripova Evoluigo

La Dokumento estas dividita en kvar sekcioj aŭ kolonoj, kun 16 ĉefprincipoj, el kiuj la unuaj kvar prezentas la ĝeneralajn principojn de la Juro de la Medio: protektadon, antaŭmalhelpon, agadon kaj esploradon.

La Antaŭparolo de la Ĉarto jam atentigas nin pri la fakto ke ni troviĝas en tikla momento de la medioprotektado. Se ni volas progresi, ni devas agnoski,

ke spite al grandioza diverseco de kulturoj kaj vivmanieroj, ni formas unusolan homan familion, unusolan mondan komunumon kun komuna sorto. Ni devas kuniĝi por krei daŭripovan mondan socion baziĝanta sur respekto al naturo, sur universalaj homrajtoj, sur ekonomia justeco kaj sur kulturo de paco.

Survoje tiucelen, ni, Popoloj de la Tero, devas transpreni respondecon unu pri la alia kaj pri la estontaj generacioj. Tiu Antaŭparolo montras al ni ke tiuj principoj de la Ĉarto estas gvidlinioj por unuopuloj, organizoj, entreprenoj, registaroj kaj transnaciaj institucioj.

Jen tiuj 16 Principoj:

I.- RESPEKTO KAJ PROTEKTO DE LA VIVKOMUNUMO

1-Respekti la teron kaj ĉian formon de vivo.

2-Zorgi pri la vivkomunumo kun kompreno, kompato kaj amo.

3-Konstrui demokratajn, justajn, partoprenigajn, daŭripovajn kaj pacajn sociojn.

4-Konservi la riĉaĵon kaj belecon de la Tero por nunaj kaj estontaj generacioj.

II.- EKOLOGIA INTEGRECO

5-Protekti kaj restarigi la integrecon de la ekologiaj sistemoj de la Tero, aparte la biologian diversecon kaj la naturajn procezojn kiuj certigas la daŭrigon de la vivo.

6-Malebligi ĉian damaĝon kaŭzitan al la medio kiel plej bona metodo por konservi ĝin kaj apliki la principon de antaŭmalhelpo tie kie la konoj estas nesufiĉaj.

7- Adopti manierojn de produktado, de konsumado kaj de reproduktado kiuj konservas la regenerajn kapablojn de la Tero, la homrajtojn kaj la komunan bonfarton.

8-Progresigi la esploradon de la daŭripova ekologio kaj subteni la liberan interŝanĝon kaj larĝan aplikadon de la akiritaj konoj.

III.- SOCIA KAJ EKONOMIA JUSTECO

9-Elradikigi la malriĉecon kiel etika, socia kaj media nepraĵo.

10- Certigi ke la ekonomiaj aktivecoj kaj institucioj ĉiunivele, favorigu la homan disvolviĝon juste kaj daŭrive.

- 11- Certigi la rajtegalecon de la seksoj kaj la justecon inter ili kiel antaŭkondiĉon al daŭripova disvolvado kaj certigi la universalan aliron al la edukado, al la sanprizorgoj kaj al la ekonomiaj eblecoj.
- 12-Defendi la rajton de ĉiuj homaj estuloj, sen distingo, je natura kaj socia medio favoriganta la homan dignon, la korpan sanon kaj la spiritan bonfarton, aparte atentigante la rajtojn de la indiĝenaj popoloj kaj de la malplimultoj.



IV.- NEPERFORTO, DEMOKRATIO KAJ PACO

- 13-Fortigi la demokratiajn instituciojn ĉiunivele kaj subteni regmanieron kiu obeas la principojn de travideblo kaj juĝeblo kaj la partoprenon de ĉiuj en la decidiĝo, kaj la aliron al la juĝsistemo.
- 14-Integri en la sistemon de edukado kaj de plua klerigado, la konojn, valorojn kaj kompetentojn necesajn por daŭripova vivmaniero.
- 15-Trakti ĉiujn vivulojn kun respekto kaj konsidero.
- 16-Disvolvi kulturon de toleremo, de neperforto kaj de paco.

Vere, kiel ni konstatas, tiu ĉi Principaro, post la ĝeneralaj principoj de Juro de la Medio, estis bazo por la postaj Celoj por Daŭripova Evoluigo, (CDE) proklamitaj ĉe UN en 2015.

16 Certe la Principo 9-a de la Ĉarto koincidas kun la 1^a CDE (“Forigi malriĉon en ĉiuj ĝiaj formoj”).

La Principo 10-a ankaŭ enhavas la 1-an 2-an kaj 8-an CDE (“Forigi malsaton, atingi manĝo-sekurecon kaj pli bonan nutradon kaj antaŭenigi daŭripovan agrikulturon” kaj “Antaŭenigi daŭran, inkluzivan kaj daŭripovan ekonomian kreskon....”).

La Principo 11-a rilatas al la 3-a, 4-a, 5-a kaj 8-a CDE (“garantii sanajn vivojn kaj kreskigi bonfarton por ĉiuj homoj en ĉiuj aĝoj”, “Garantii inkluzivan kaj egalecan bonkvalitan edukadon.....” “atingi egalecon inter la seksoj kaj plivastigi la decidopovon de ĉiuj virinoj kaj junuloj”, “antaŭenigi daŭran... ekonomian kreskon”).

La Principo 12-a enhavas la 3-an CDE (“garantii sanajn vivojn kaj kreskigi bonfarton por ĉiuj homoj en ĉiuj aĝoj”), sed, kiel vi povas konstati la Ĉarto de la Tero rigardas jam al estonteco, kiam en la Principo 12-a petas atenti la rajtojn de la indiĝenaj popoloj kaj de la malplimulto

La Principoj 13-a kaj 14-a rilatas ankaŭ al la 16-a kaj 17-a CDE, garantii (“ aliron al justico por ĉiuj homoj kaj starigi efikajn, respondecajn kaj inkluzivajn instituciojn je ĉiuj niveloj”, kaj “Plifortigi la realigajn kapablojn kaj revigligi la tutmondan partnerecon por daŭripova evoluigo”).

La Principo 15-a enhavas la 13-an, 14-an kaj 15-an CDE, ĉar rilatas al la konservado de ĉiu vivulo, ĉu en la oceanoj, ĉu la teraj ekosistemoj kaj biodiverseco.

Fine la 16-a Principo rilatas plurajn celojn, sed precipe rilatas al 16-a CDE (“Antaŭenigi la konstruadon de pacaj kaj inkluzivaj socioj por daŭripova evoluigo, garantii aliron al justico ... kaj starigi efikajn, respondecajn kaj inkluzivajn instituciojn...”).

II Daŭra proceduro kaj referenckadro

La Ĉarto estis ellaborata tra tutmonda konsultado dum pli ol 6 jaroj, implikante ekspertulojn pri Internacia Juro, sciencistojn, NRO-ojn kaj baz-societojn. Sed tiu longdaŭra proceduro ne temas nur pri la partopreno en la ellaborado de la teksto sed, tio kio estas pli grave, la Ĉarto enhavas ŝlosilajn principojn esprimitajn en diversaj traktatoj kaj interkonsentoj vortigitajn dum kunsidoj ĉe UN post la 90-a jardeko, kiel la Pintkonferenco pri Virinoj kiu agnoskis la egalecon de genro, okazinta en Pekino 1995, la Pintkunsido de la Virino, de Berlino 2007 kiu agnoskas la rajton de virinoj plenumi elstarajn postenojn en registaroj, ekonomiaj kaj sociaj entreprenoj ktp.

1 Vi povas legi la CDE en mia artikolo “De la Jarmilaj Celoj al Daŭripova Evoluigo” en *Jura Tribuno Internacia* N° 15, jaro 2016, paĝoj 25-42.

Kompeneble post la jaro 2000 sekvis gravaj okazintaĵoj kaj konferencoj rilataj al la kernaj temoj enhavantaj en la Principoj de la Ĉarto de la Tero. Tiel, en 2002 okazis Pintkonferenco de Johanesburgo pri Daŭripova Evoluigo, kunvokita de UN de la 26-a de aŭgusto ĝis la 4-a de septembro kie la partoprenantoj subskribis Deklaracion pri Daŭripova Evoluigo. Tiu ĉi Deklaracio celis antaŭenigi la ekonomian kaj socian evoluon kaj samtempe prizorgi la protektadon de la medio, kiel komplementajn pilierojn de daŭripova evoluigo.



La jaro 2015 estis ege grava por nia tutmonda medio. Vekis granda intereso i.a la Encikliko de Papo Francisko *“Laudato si”*. Temas pri etiko-religia dokumento, de 24-a de majo 2015, kiu per 6 ĉapitroj montras la urĝan defion ŝirmi “nian komunan domon”, kaj la celon kunigi la tutan homan familion por serĉi daŭripovan evoluigon. La Encikliko proponas “integran ekologion kiu enhavos la homajn kaj sociajn dimensiojn”, kaj invitas al nova urĝa dialogo pri la nuna maniero solvi la estontecon de nia planedo. Do, integra ekologio kiel nova paradigmo de justico, ĉar la naturo ne estas simpla kadro de nia vivo, sed parto de ĉiu homa kaj socia dimensio.

Post aliaj gravaj konvencioj, kaj post unu jaro da malfermitaj intertraktadoj, ĉe UN oni interkonsentis finan dokumenton nomatan “Por aliigi nian mondon: Agendo pri Daŭripova Evoluigo 2030”, Kaj en septembro 2015 okazis en Novjorko la altnivela kunsido de la Ĝenerala Asembleo de UN. Naskiĝis tiel la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo, validaj ĝis 2030. Internacia Fakgrupo konsentis liveri raporton en marto 2016.



Supera Tribunalo de Irlando





Juraj Informoj

- **Kvalifiki taŭro-ludiston, kiu forpasis en la taŭro-ludejo, kiel murdiston ne povas esti konsiderata uzo de esprim-libero.-**

Tion ĵus proklamis la Konstitucia Tribunalo de Hispanio, kiam oni malakceptis apelacion kontraŭ juĝo de Supera Tribunalo, kiu punis homon monkompensi la familianojn de taŭro-ludisto, okaze de fikomentarioj en Fejsbuko. Laŭ tiu juĝo la uzitaj esprimoj estis tute ne-konvenaj kaj misproportciaj, do ili ne povas esti protektataj de la esprim-libero.

La juĝo ankaŭ asertis, ke cele la defendon de kontraŭ-taŭroludista pozicio, ne estas necese kvalifiki taŭro-ludiston kiel murdiston aŭ opresanton kaj montri plen-ĝojon pro ties morto. Ankaŭ ne estas necese akompani tiujn komentariojn per fotografaĵo de dolor-plena agonianta homo tuj post esti vundita de taŭro, ĉar tio sendube, kaŭzis grandan doloron al familianoj.

Ĉi tiuj familianoj denunciis lin pro kontraŭ-leĝa atako al rajtoj pri honoro, privateco kaj propra bildo de la forpasinto. Laŭ la juĝo, la esprim-libero ne povas protekti insultojn aŭ fikomentarioj. Tiel, la juĝo asertas, ke:

“ Montri feliĉon pro la morto de homo, dum la realigo de ties profesio, kaj kvalifiki lin kiel murdiston, protektita de defendo de kontraŭ-taŭroludaj pozicioj, kelkaj horoj antaŭ ol forpasi, estas ne-pravigebla malkono de la centra pozicio okupata de homo en nia demokratia socio kaj de la necesa respekto de alies rajtoj ”.

Kontraŭe, unu el la juĝistoj sciigis sian kontraŭan voĉon. Ĉi tiu juĝisto ne konsentis kun la juĝo de la tribunalo. Ŝi defendis, ke la komentarioj de tiu homo en la socia reto Fejsbuko havas politikan signifon rilate temon pri kiu ekzistas granda debato en Hispanio, tio estas pri la taŭroludado.

• Nuligitaj aŭtorajn rajtojn de la mistera sur-mura pentristo *Banksy*.-

Antaŭ kelkaj monatoj la Oficejo pri Intelektala Propraĵo de la Eŭropa Unio nuligis tiun rajton favore al pentristo *Banksy* de la sur-mura pentraĵo “Florĵetanto”. Temas pri unu el la plej konataj pentraĵoj de la ne-konata kaj mistera pentristo *Banksy*. Pri li oni scias nur, ke li naskiĝis en la brita urbo Bristol en la jaro 1974. Liaj mur-pentraĵoj ĝenerale montras satirajn bildojn pri politiko, kulturo kaj moralo.



Okaze de tiu unua decido oni jam sciigis, ke pri ceteraj pentraĵoj de ĉi tiu sama aŭtoro ankaŭ povus esti nuligitaj ĉiajn aŭtorajn rajtojn. Tiel, antaŭ kelkaj semajnoj oni nuligis tiujn rajtojn rilate la pentraĵon “*Vi ridu nun, sed iam ni prenos la povon*”. Okaze de ambaŭ procesoj *Banksy* estis reprezentita de la firmao “*Pest Control Office*”, kiu denunciis la uzon de *Banksy*-desegnaĵoj fare de la eldonejo “*Full Colour Black*”. Laŭ la juĝo, oni ne povas konsideri ne-konatan desegniston kiel posedanton de aŭtoraj rajtoj. En la jaro 2019 *Banksy* inaŭguris en la urbo Londono vendejon. Tiam li volis montri, ke tiuj sur-muraj desegnaĵoj havis aŭtoron kaj tiel ili devis esti protektitaj de la intelekta propreco, kvankam la aŭtoro estas ne-konata.

Rilate la pentraĵon “*Vi ridu nun, sed iam ni prenos la povon*”, *Banksy* desegnis ĝin en la jaro 2002 en la brita urbo Brajtono. Ekde tiam oni reproduktis ĝin libere. Laŭ la juĝo, tiu pentraĵo troviĝas ĉe publika loko, do, oni povas fotografi ĝin sen-lime, pro tio la artisto, laŭ la juĝo, sciis de antaŭ multe da tempo, ke tiuj reproduktitaĵoj povus esti vendataj sen kontrolo aŭ rajtigo de la aŭtoro.

• Liberigita la plej soleca elefanto en la mondo.-

La elefanto *Kaavon*, konsiderata kiel “la plej trista kaj sola en la mondo” estos denove libera post 30 jaroj en la best-ĝardeno de Islamabado (Pakistano). Ĉi tiu griza elefanto estis donacita de la registaro de Srilanko al Pakistano, kiel pruvo de bonaj rilatoj inter ambaŭ ŝtatoj. Ĝi tuj fariĝis la ĉefa stelo en la ĝardeno.



Multaj jaroj da mallibero, malbonaj viv-kondiĉoj kaj emocia ŝoko post la morto de ĝia kunulino *Saheli* kaŭzis al *Kaavo* fortan deprimon. Post kelkaj incidentoj la respondeculoj de la best-ĝardeno decidis alĉatani ĝin. Tiam komenciĝis kampanjo en la sociaj retoj kun la celo liberigi la elefanton. Tribunalo en Pakistano ordonis pristudi la vivajn kondiĉojn de *Kaava*, kiu laŭ informo redaktita *estas tute deprimita, en stato de streso kaj kun gravaj anomalioj en ĝia konduto, pro la soleco, la katenoj kaj la absoluta manko da viv-spaco.*

Do, la Supera Tribunalo de Pakistano ordonis liberigi ĝin kaj akceptis proponon de natura parko en Kamboĝo por fariĝi la nova hejmo de *Kaavan*. La Tribunalo asertis, ke neniu dubo povas ekzisti pri la ĝuo de elementaj rajtoj fare de “ne-homaj bestoj”. La juĝisto *Athar Minaallah*, en la juĝo, eĉ ripetis frazon de la profeto Mohamedo: *bona ago farita al besto estas tiel laŭdinda kiel bona ago farita al homo; do, kruela ago farita al besto estas tiel riproĉinda kiel kruela ago farita al homo.*

- **Kondmanita legi klasikajn romanojn.-**

Juĝisto en la brita urbo Leicester ĵus kondamnis al 21-jaraĝa junulo, simpatianta al nazia ideologio, legi klasikajn romanojn kaj tiel eviti eniri en malliberejon.

La junulo malŝargis el interreto 70.000 dokumentojn kaj tekstojn pri blank-haŭta hegemonio, inter kiuj troviĝis manlibroj por fabriki bombojn. La juĝisto konsideris, ke verŝajne tio ŝuldiĝis al “adoleskula frenezaĵo”, ĉar temas pri soleca individuo kun malmultaj amikoj, do facile submetebla al fiaj influoj.



La juĝisto devigis al junulo promesi, ke li ne plu serĉos tiujn dokumentojn en la reto, male, li devos legi la verkojn “*Fiereco kaj antaŭjuĝemo*” de Jane Austin, “*Historio de du urboj*” de Charles Dickens kaj “*La dekdua nokto*” de W. Shakespeare. Laŭ tiu juĝo, la junulo devos reveni en la juĝejon post kvar monatoj kaj tiam la juĝisto konstatos, ĉu li legis tiujn librojn. La juĝisto aldonis... *mi submetos vin al testo pri legado kaj se vi ne sukcesos, vi suferos en la malliberejo.*

Krom la promeso pri legado, la juĝo rajtigas la policon kontroli la serĉadojn en interreto faritaj de la junulo.



**Kio estas la Internacia Jurista
Esperanto-Asocio ?**

JURA
TRIBUNO
INTERNACIA §

Num. 18
Juro 2019
Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Jura Tribuno Internacia
Oficiala organo de IJEA

www.esperanto.org



Juraj Universalaj Tekstoj

Ĉi tie vi trovos la tradukon en Esperanton de gravaj internaciaj juraj tekstoj.



Libroj eldonitaj

Inter la celoj de IEAJ troviĝas la publikigo en Esperanto de verkoj rilataj al juro.



Statuto de IJEA

Valida ekde la aprobo de la asemblea kunsido de 24.07.2016 okazigita en Nitro (Slovakio)



Vortaro

Jura Terminologio



Kursoj

- Kurso pri Internacia Mar-Juro

ntojuro.org



Nia celaro

Jen la celoj de Internacia Jurista Esperanto-Asocio.



Fariĝu membro de IJEA !

Se vi laboras aŭ rilatas al juraj medioj, ne hezitu: vi povas ĉef-rolu en IJEA.



Estraro de IJEA

Opinio de la Internacia Kortumo pri la Ĉagosoj

La Ĉagosa Insularo estas arkipelago ĉe la Hinda Oceano, kiu konsistas el grupo da sep atoloj enhavantaj pli ol 50 insuloj. Ĉi tiu teritorio estis parto de la kolonio Maŭricio, sub brita regado de la jaro 1814. La tuta teritorio formis ununuran kolonion sub tiu nomo: Maŭricio, ĝis kiam la brita registaro en la jaro 1965 decidis disigi la ĉagosan insularon el la maŭricia kolonio. Aperis tiam nova kolonio: la Brita Teritorio en la Hinda Oceano. La ĉefa, sed ne sciigita celo, de tiu teritoria disigo estis utili tiujn insulojn, pli specife atoloj, kun militaj celoj kune kun Usono, kiu establis tie gravegan armean bazon sur la insulo *Diego García*. Ĉi tiu disigo naskiĝis okaze de la, tiel nomita, Akordo de *Lancaster House*, subskribita de la brita registaro kaj maŭrica delegacio, kies plejmulto el la membroj estis, siafoje, nomumitaj de la brita guberniestro en Maŭricio.



La Ĉagosa Insularo en la Hinda Oceano

La rezolucio 2066 (XX) de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj invitis al Britio aprobi kaj efektiviĝi nenian decidon, el kiu povus rezulti la dispartigon de la kolonio Maŭricio kaj tiamaniere perforti ties teritorian integrecon. Britio ignoris ĉi tiun rekomendon de la Ĝenerala Asembleo kaj tiel, en 1966, nur unu jaron poste, subskribis akordon kun Usono cele la uzon de la

nova kolonio de Brita Teritorio de la Hinda Oceano kun armeaj celoj. Post ĉi tiu akordo, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj aprobis la rezoluciojn 2232 (XXI) kaj 2357 (XXII), kiuj pritraktis la situacion en la kolonio Maŭricio, kaj en aliaj teritorioj.

Ĉi-foje, la Ĝenerala Asembleo esprimis sian profundan maltrankvilon pro la daŭra politiko de Britio, kiu celis, inter aliaj aferoj, la rompon de la teritorian integrecon de la kolonio, malgraŭ pasintaj rezolucioj kaj samtempe oni substrekis la rajton de la popolo je memdetermino kaj sendependiĝo. La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj samtempe memorigis, ke kiu ajn pruvo disrompi la nacian unuiĝon kaj la teritorian integrecon de la koloniigitaj teritorioj estis tute kontraŭa al la celoj kaj principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj.



Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj

Maŭricio sendependiĝis en la jaro 1968, ekde tiu sama jaro la nova ŝtato deklaris, ke la disigo de la Ĉagosoj el Maŭricio estis tute kontraŭa al la internacia juro. Alie, dum tiuj jaroj la brita registaro forpelis la ĉagosanojn el la insularo kaj oni malpermesis la revenon, pro la fakto, ke la teritorio estus uzata kiel gravega arma bazo de Usono. Do, Maŭricio prezentis tiun aferon en kelkaj internaciaj instancoj, ekz. la 27-an de julio 2010 ĉe la Afrika Unuiĝo, ĉi tiu internacia organizo proklamis, ke la disigo de la Ĉagosoj el la maŭrcia teritorio, plenumita de la eksa kolonia potenco, perfortis la rezoluciojn de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu malpermesis, ke la koloniantaj potencoj povus disrompi la koloniigitajn teritoriojn antaŭ la sendependiĝo.

En la jaro 2017 la registaro de Maŭricio atingis grandan venkon en Unuiĝintaj Nacioj, tiam oni aprobis la rezolucion 71/292, kiu petis al la Internacia Kortumo ties opinion rilate jenajn konkretajn aferojn:

a) Ĉu la malkoloniiganta procezo de Maŭricio plenumiĝis akorde al juro kiam sendependiĝis en la jaro 1968, post la disigo de la Ĉagosoj el Maŭricio kaj akorde al internacia juro, inkluzive la devigoj aperantaj sur la rezolucioj de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj 1514 (XV) de la 14-a de decembro 1960; 2066 (XX) de la 16-a de decembro 1965, 2232 (XXI) de la 20-a de decembro 1966 kaj 2537 (XXII) de la 19-a de decembro 1967 ?

b) Kiuj rezultoj sekvas, laŭ la internacia juro inkluzive la devigoj aperantaj sur la jam menciitaj rezolucioj, pro la fakto, ke Britio daŭre administras la Ĉagosan insularon, inter alie, rilate la fakton, ke Maŭricio ne povas validigi programon por relokigi siajn naciaĵojn en la Ĉagosa insularo, ĉefe la devenantojn de tiu arkipelago ?

La 25-an de februaro 2019, la Internacia Kortumo publikigis sian opinion rilate al la demandoj proponitaj de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. Unualoke, estas necese klarigi, ke inter la taskoj de la Internacia Kortumo troviĝas la respondo al demandoj faritaj de organoj de Unuiĝintaj Nacioj. Temas pri la diskonigo de opinioj de la Kortumo rilate konkretajn aferojn, tio estas, ne temas pri juĝoj aŭ informoj post la propono de du aŭ pliaj ŝtatoj. La Internacia Kortumo ne estas nepre devigita respondi tiujn konsultojn, tamen la internacia jurisprudenco fiksas, ke la Kortumo nur povas rifuzi tiujn respondojn se ekzistas imperativaj kialoj. Do, kiam Unuiĝintaj Nacioj havigis tiujn demandojn al la Internacia Kortumo kelkaj ŝtatoj opiniis, ke la Kortumo ne devus respondi, pro la fakto, ke ekzistis disputo pri la suvereneco de la teritorio inter du ŝtatoj: Britio kaj Maŭricio. Do, se neniu el ili prezentis tiun disputon al la Internacia Kortumo, la tribunalo ne rajtis esprimi sian opinion tiurilate.

Responde al tiu unua pledo, la Kortumo klarigis ke kiam la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj prezentis tiujn demandojn, oni ne petis trovi solvon al pri-suverenea disputo, male, temis nur pri helpo al la Ĝenerala Asembleo en ties taskoj rilate malkoloniigantajn procezojn. Do, ne estis necese pristudi aŭ pritrakti la aferon pri la suvereneco de la teritorio, nur temis pri la havigo de respondo al du konkretaj aferoj rilataj al la malkoloniigo de la insularo kaj pri tio la Ĝenerala Asembleo ja respondeciĝas.

La 25-an de februaro 2019 la Internacia Kortumo diskonigis sian opinion. La teksto, unualoke, pristudas la akordon de *Lancaster House*. La Kortumo asertis, ke ne estas eble paroli pri internacia interkonsento en tiu kazo, pro la fakto, ke unu el la partioj, Maŭricio, troviĝis en tiu momento sub la administrado kaj regado, de koloniiganta potenco, tio estas de Britio. Do, kvankam pere de la akordo de *Lancaster House* Maŭricio akceptis la forcedon de la Ĉagosoj al Britio, tiu teritoria disigo ne baziĝis sur la libera esprimo de popola deziro, ĉar la maŭriciaj reprezentantoj, kiuj subskribis la akordon, estis nomumitaj de la guberniestro de la kolonio, siafoje



Manifestantoj en Londono postulas la eblon reveni en la Ĉagosan Insularon

nomumita de la brita registaro, tio estas, de la alia parto de la akordo. Do, la Kortumo deklaris, ke Maŭricio ne libere konsentis la disrompon de sia teritorio.

Kiel respondo al la unua demando proponita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, la Justica Kortumo konkludis, ke pro la fakto, ke la disigo de la Ĉagosoj el Maŭricio kaj la fondiĝo de nova brita kolonio ne rezultis post la esprimo libere decidita de la maŭricia popolo, la malkoloniiganta procezo ne estis leĝe plenumita de la koloniiganta potenco kiam Maŭricio sendependiĝis en la jaro 1968.

Per la respondo al la dua demando, tio estas: pri la juraj konsekvencoj de la daŭra administrado de la Ĉagosoj fare de Britio, la Internacia Kortumo deklaris unualoke, ke pro la fakto, ke la malkoloniigo de Maŭricio ne respektis la rajton de memdetermino de la popoloj, la administrado de la insularo fare de Britio estis kontraŭ-leĝa daŭra fakto, provokita de la disigo de la insularo el Maŭricio. Do, Britio estis devigata finigi sian administracion sur la insularo kiel eble plej rapide, kaj post tio Maŭricio povos kompletigi sian malkoloniigon laŭ efektivigo de la rajto de memdetermino de la popoloj

Laste, rilate la situacion de la maŭrciaj nacioj, inkluzive tiujn de la ĉagosa insularo forpelitaj el la arkipelago kaj ties resetlejo, la Kortumo asertis, ke ĉi tiu afero enkadriĝas ene de la protektado de la homaj rajtoj, kiuj devus esti solvita de la Ĝenerala Asembleo de UN okaze de la kompletigo de la malkoloniigo de Maŭricio.



Insulo Diego García, tie Usono disponas pri gravega arma bazo

Post la diskonigo de la opinio de la Internacia Kortumo, la Ĝenerala Asembleo de UN decidis la 22-an de majo 2019, aprobi rezolucion pere de kiu oni petis al Britio forlasi la teritorion de la Ĉagosoj antaŭ ol ses monatoj; rehavigi la insularon al Respubliko Maŭricio kaj ebligi la revenon de la enloĝantoj de la insularo forpelitaj de la britoj post 1965. Surprize, ĉi tiu rezolucion de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝiaj Nacioj restis aprobita per 116 voĉoj proaj, 56 sindetenoj kaj 6 kontraŭaj (Aŭstralio, Usono, Hungario, Israelo, Maldivoj kaj Britio).

Ĉar temas pri rezolucio de la Ĝenerala Asembleo, ĝi ne estas deviga normo, kvankam reale temas pri forta bato, laŭ la politika kaj diplomacia vidpunkto, kontraŭ Britio kaj ankaŭ kontraŭ Usono, ĉar ĉi tiu ŝtato uzas la insularon kiel armean bazon. Tiel, Usono petis al siaj kunligitaj ŝtatoj voĉdoni kontraŭ la rezolucion kaj subteni la britan karakteron de la teritorio, pro la fakto, ke temas pri grava bazo por la usona armeo kaj ĝi troviĝas proksime al Afganio kaj Irako. La luigo de la arma bazo daŭriĝos ĝis la jaro 2036, pro tio, la brita ambasadorino ĉe UN, S-ino *Karen Pierce*, proponis, ke la insularo devus resti sub brita administrado almenaŭ ĝis tiu jaro.

La afero pri la uzo de la insularo kiel arma bazo estas gravega, pro la fakto, ke unu el argumentoj prezentitaj de la maŭricianoj por certigi la kontraŭleĝon de la disrompo de la kolonio estas la fakto, ke laŭ la Akordo de *Lancaster House* Britio rehavigus la insularon al Maŭricio kiam la teritorio ne estos necesa por defendaj aferoj. Do, la disrompo de la kolonio baziĝis sur artefaritaj aferoj, ne pro la deziro de la popolo. Tiurilate, la ĉefministro de Maŭricio, S-ro *Pravind Kumar Juqnauth* deklaris, ke Maŭricio estas preta subskribi akordon kun Britio kaj Usono cele la militan uzon de la bazo de Diego García, la ĉefa atolo de la ĉagosa insularo.

José M. Rodríguez
Hispanio



Internacia Kortumo en Den Haag (Nederlando)



Kriminala Kortumo en Dublino (Irlando)





Kaŭcio

Kaŭcio estas la monsumo, kiun oni deponas aŭ kiun oni promesas pagi por garantii la plenumon de interkonsento aŭ kontrakto farita de la kaŭcianto aŭ de alia homo. Kaŭcio ankaŭ estas la antaŭ-juĝa rimedo decidita de juĝisto aŭ de tribunalo por asekuri la mon-pagon aŭ por liberigi akuziton antaŭ la adopto de juĝo.

Tipoj de kaŭcioj:

- Alies solidara kaŭcio, temas pri la kompromiso de homo por certigi pagon aŭ ian plenumon fare de alia kontraktanto. Tio estas, se la kontraktanto ne plenumas sian devon okaze de la kontrakto, tria homo devos pagi ĝin pere de tiu kaŭcio.

- Kaŭcio bazita ne en la depono de mon-sumo sed en la hipoteko de ne-moveblaĵo.

- Mona kaŭcio, temas pri la plej tipa kaŭcio, ĝi baziĝas sur la depono de mon-sumo por garantii la plenumon de kontrakto.

Nepraj kondiĉoj por la kaŭcio:

- Interkonsento: devas ekzisti libera konsento inter kaŭcianto kaj la kreditoro por proponi kaj akcepti la kaŭcion.

- Objekto: temas pri la mono aŭ objekto (ekz. ne-moveblaĵo) deponita, kiu utilos kiel pago se fine la interkonsento aŭ kontrakto ne plenumiĝas fare de la kaŭcianto.

- Ĉefa kontrakto aŭ interkonsento: kiel dirite la kaŭcio garantias la plenumon de kontrakto aŭ interkonsento pra-ekzistanta.

Partioj en la kaŭcio

- Kreditoro: temas pri la homo kiu petas la garantiigon de kontrakto aŭ interkonsento pere de kaŭcio. Kaze de ne-plenumo de la kontrakto aŭ interkonsento la kaŭcio, ekz. mon-pago, apartenos al li.

- Kaŭcianto: homo kiu deponas monon aŭ objekton kiel garantion. Li povas esti la deviginto plenumi la kontrakton aŭ interkonsenton, aŭ tria homo.

- Tria homo: ne necese aperas ĉi partio en ĉiuj kaŭciaj kontraktoj. Ĉi tiu tria homo devigas sin deponi kaŭcion, kvankam li ne devigis sin plenumi kontrakton aŭ interkonsenton kun la kreditoro.

Kiam la kaŭcio NE estas valida?

- Kiam kaŭcianto aŭ kreditoro ne estas plenaĝuloj aŭ ne ĝuas ĉiajn civilajn rajtojn por kontrakti.

- Kiam la kontrakto aŭ interkonsento estas kontraŭ-leĝa. Ebla kaŭcio proponita por certigi tian kontrakton ankaŭ estos kontraŭ-leĝa.

- Kiam la kaŭcio estas kontraŭ-vole proponita de la kaŭcianto, pro minaco aŭ perforto.

Specialaj tipoj de kaŭcioj

Avalo: temas pri garantio priambio donita de tria persono, kiu devontigas sin pagi sumon, se ĝi ne estas pagita de la subskribinto. Avalo ne ekzakte similas al kaŭcio, kvankam ambaŭ juraj kontraktoj tre similas. Avalo ĉiam garantias mon-pagon, ne alian kontrakton kaj ĉiam estas havigita de tria homo, ne de la kontraktanto mem.

Kaŭcio por la praktikado de profesio aŭ agado: reale temas pri iaspeca garantio fiksata por kovri eblajn damaĝojn, kiuj povas okazi dum praktikado de profesio aŭ la realigo de konkreta agado. Tiel, oni povas peti al praktikonto la deponon de mon-sumo, de avalo aŭ de garantio por kompensi tiujn eblajn damaĝojn.

Kunlaboru kun JURA TRIBUNO INTERNACIA

Se Vi emas verki en esperanto pri juraj temoj ni plezure aperigos Viajn kontribuaĵojn en niaj paĝoj. Ne dubu kunlabori kun la jura revuo. La proksima numero aperos dum la monato januaro 2022, do, prefere se oni ricevas la materialon antaŭ la fino de la monato decembro 2021.

Nia ret-adreso: jurista@esperanto.ac

Galerio de elstaraj esperantistaj juristoj



Umberto Stoppoloni

Italo, 1917 ~ 2001

Juĝisto en Pistoia (Italio). Esperantisto de la jaro 1951. Ekde 1963 li okupis diversajn estrarajn funkciojn en Itala Esperanto-Federacio, ties prezidanto inter 1966 kaj 1971. Konstanta propagandisto de la internacia lingvo, aŭtoro de libroj kaj ofta kunlaboranto en jura E-eldonaĵoj. Nuntempe la E-grupo de Pistoia havas lian nomon.



Kino kaj



Juro

Verkoj pri juraj temoj estas tre oftaj en filmoj, krome se en ili aperas mafiaj intrigoj la rezulto sendube povas esti alloga. Unu el tiuj verkaĵoj estas la romano **“The Firm” (La Firmao)** de John Grisham, eldonita en la jaro 1991. Du jaroj poste, Sidney Pollack reĝisoris samnoman filmon, kie ĉefrolis Tom Cruise.

La filmo rakontas la historion de Mitch McDeere (Tom Cruise), juna kaj brila advokato allogita de prestiĝa advokat-firmao en Usono. En tiu nova laborejo, krom interesaj taskoj, li trovas altan salajron kaj allogajn sociajn profitojn, kiel uzon de veturilo, loĝejo pagita de la entrepreno, luado de somer-domo, ktp. Kompreneble la juna advokato akceptas la taskon.

Lia edzino Abigail “Abby” (Jeanne Tripplehorn) ne multe fidis pri tiu situacio. Ŝi suspektas, ke ekzistas obskura fono en tiu firmao, ĉar ĉirkaŭ ĝi, privata vivo apenaŭ eblas ĉar ĉio estas kontrolata de la entrepreno. Post kelke da tempo ankaŭ la juna advokato suspektas ke ĉe la firmao oni realigas kontraŭ-leĝajn aferojn, ĉar ĉiuj advokatoj kiuj antaŭe deziris forlasi la firmaon mortis.



The Firm. (1993) Produktita de Davis Entertainment kaj Mirage Enterprises. Reĝisorita de Sidney Pollack. Ĉefaj aktoroj: Tom Cruise, Jeanne Tripplehorn, Gene Hackman, Ed Harris, Holly Hunter, Hall Holbrook kaj David Strathairn.

La polica departemento kontaktas kun la juna advokato. Li estas sciigata, ke la firmao reale estas la leĝa reprezentanto de mafia organizo kaj pere de ĝi, la mafio monlavadas siajn profitojn. Policano helpo-petas al Mitch por malkovri tiujn finegocojn. Krome, se la advokato kunlaboras kun la polico, lia frato, enprizonigita, povus resti libera.



Gene Hackman kaj Tom Cruise en “La Firmao”

Tamen, la juna advokato ne ŝatas tiun proponon. Se li akceptas li perdus sian advokatan karieron kaj eĉ sian liberecon, ĉar li devos esti protektita kiel ĉefa atestanto en proceso kontraŭ mafianoj. Sed, li scias, ke se li ne kunlaboras kun policanoj, lia propra vivo danĝeras, ĉar la ceteraj advokatoj en la firmao ekmalkonfidis pri li. Do, kion fari?

La advokato trovas solvon dank'al afero kiu, unuavide, povas esti ne-grava. Li eltrovas, ke multaj advokatoj en la firmao ofte informas pri labor-horoj dum kiuj reale ili ne laboris, do temas pri fiska fraŭdo. Tiel, se oni akuzas la firmaon kiel fraŭdanton, ne kiel kunlaborantojn de la mafio, la mafianoj povos foriri trankvile el la firmao. La advokato kopias ĉiujn arkivojn kiuj povas kulpigi la advokatejon kaj li havigas ilin al polico. Samtempe, li foriras al fora insulo. Tiel, li atingis forlasi la firmaon kaj ne okazigi problemojn al mafianoj, kiuj povos serĉi alian novan entreprenon por monlavadi.

La filmo estis nomumita dufoje por la Oskar-premio, tamen fine ĝi atingis neniun el ili. “La Firmao” atingis grandan sukceson en kinejoj, ĉefe pro la bonega laboro de la aktoroj Tom Cruise, la juna advokato, kaj Gene Hackman, la ĉefa advokato de la firmao.

ALIĜU AL INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO

Kiu rajtas esti membro de I.J.E.A.?

- Ordinara membro: devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri Juro.
- Membro-studento: devas studi por licenciigo pri Juro.
- Membro-staĝanto: devas staĝi en jura profesio.
- Membro-korespondanto: devas utile kunlaboradi kun la Asocio, ĉu esperanto, ĉu alilingve, jen spontane, jen laŭ invito de la Asocio.

Kiel aliĝilo plenumu la sekvantan paĝon kaj sendu ĝin al
jurista@esperanto.ac

Kotizoj.

La jara kotizo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latin-Ameriko. Se vi loĝas en alia lando la kotizo estas 14 eŭrojn.

Membro-studentoj aŭ membrostaĝantoj pagas neniom.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r. Ankaŭ oni povas aboni la jaran kotizon rekte okaze de la Ĝenerala Asembleo kiu ĉiu-jare okazas kadre de la Universala Kongreso de Esperanto.

Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al nia adreso: *jurista@esperanto.ac*





Internacia Jurista Esperanto-Asocio I.J.E.A.

ANIĜILO / MEMBRILO

Foto

Antaŭnomo:

Familia nomo:

Profesio:

Poŝtadreso:

Retadreso:

@

Urbo:

Lando:

Nacieco:

Kategorio de estonta asociano: ordinara asociano jurstudento
staĝanto korespondanto

Mi, pere de ĉi tiu peto, kandidatiĝas al la statuso de membro de IJEA obeonte ties statuton kaj pagonte la ĉi-suban kotizon.

Jarkotizo (se ordinara membro de ne-esceptaj landoj) 14 eŭroj
(se ordinara membro de iamaj socialismaj
orient-eŭropaj landoj, Azio -escepte Koreio,
Japanio kaj Israelo), Afriko kaj Latinameriko..... 7 eŭroj

Pagmaniero: Eblas ĝiri al UEA-konto **ejax-r**

Subskribo de la kandidato

Decido pri la kandidateco
per subskribo de IJEA estrarano

Sekretario-Kasisto: jurista@esperanto.ac
Prezidanto: mfb@debastosadvogados.com

**Internacia Jurista Esperanto-Asocio
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**